Esperanta Vikimanio 2011

Svitavy, Ĉeĥio

**Angla originalo:**

Christopher T Cooper (User:CT Cooper)

prezentita dum Wikimania 2011 en Haifa, Israelo

**Traduko en Esperanto:**

Marek Blahuš (User:Blahma)

# Libereco de panoramo kaj Vikimedia Komunejo

# Kio estas Vikimedia Komunejo?

- "Vikimedia Komunejo estas deponejo de multmediaj dosieroj, kiu disponigas publikhavaĵan kaj liberpermesilan edukan multmedian enhavon (bildoj, sonoj kaj videoj) al ĉiuj homoj" – Commons:Project scope
  - "Publika havaĵo" – Tute sen kopirajto
  - "Libera permesilo" – Pli komplike

# Kion signifas „liberpermesila“?

- Fiksa difino uzata de Vikimedia Fondaĵo
- Por ke verko estu libera, posedanto de la kopirajto devas permesi al ĉiu:
  - uzi kaj pludistribui la verkon, ankaŭ komerce
  - krei derivaĵojn de la verko
    - … sed la kopirajto-posedanto tamen plu laŭplaĉe rajtas postuli:
      - atribuon
      - samkondiĉecon
- La difino <u>ne</u> mencias unuopajn landojn

# Kopirajta juro pri arĥitekturo kaj artaĵoj

- La Berna konvencio

  Akceptita de pli ol 160 landoj
- Diras ke arĥitekturaj kaj artaj verkoj estas kopirajteblaj
- Bildoj en kiuj aperas arĥitekturaj aŭ artaj verkoj tial estas konsiderataj derivaĵoj
- Malhelpas disponigon de tiaj bildoj sub libera permesilo

# Esceptoj en la kopirajta juro pri arĥitekturo kaj artaĵoj

- Kvar ĉefaj esceptoj:
  1. Libereco de panoramo
  2. Elĉerpiĝo de kopirajto
  3. Sub la sojlo de originaleco
  4. Banala inkludo – *de minimis*

„Justa uzo“ („fair use“) de bildoj en la Vikimedia Komunejo <u>ne</u> estas permesita …

… sed kun marko “nelibera enhavo” tio eblas en la angla Vikipedio kaj kelkaj aliaj projektoj.


# Escepto 1: Libereco de panoramo

- Mallongigo LdP (FoP)
- El la germana *Panoramafreiheit*
- Germana kopirajta juro: Bildoj de konstruaĵoj aŭ skulptaĵoj ne estas malrespekto de kopirajto
  - …se ili estas "daŭre situantaj en publika loko"
- Pozitiva escepto al la kopirajta juro
  - Termino ofte miskomprenata kaj misuzata



# Escepto 1: Libereco de panoramo

- Uzebla LdP ekzistas en multaj landoj:
  - Ĉeĥio (kaj EU): permanente lokita en publika spaco
  - Israelo: arĥitekturo, skulptaĵoj kaj aplikita arto
  - Usono: nur konstruaĵoj
  - Britio: ne koncernas “2-dimensiajn verkojn”
- En kelkaj landoj LdP ne estas uzebla pro troa limigo:
  - eks-Sovetunio: Nur por nekomerca uzo
  - Grekio: Nur “fojfoja reprodukto” fare de “amaskomunikiloj”
  - Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj: Nur en elsendoj
- Aliaj landoj tute ne konas LdP-n:
  - Francio
  - Italio
  - Kataro



# Escepto 2: Elĉerpiĝo de kopirajto

- La rajtoj de aŭtoroj pri iliaj verkoj iam elĉerpiĝas
- Verkoj kies kopirajto elĉerpiĝis estas publika havaĵo
- Landoj libere decidas la kondiĉojn sed ekzistas iuj minimumoj:
  - Akceptintoj de la Berna konvencio: Vivo + 50 jaroj
  - Membroj de Eŭropa Unio: Vivo + 70 jaroj
- Ofte specialaj reguloj por anonimaj verkoj kaj fotografio
- En Usono tre komplikita



# Escepto 3: Sub la sojlo de originaleco

- Por esti kopirajtebla, objekto devas esti “sufiĉe originala”
- Ofte aplikata al emblemoj
- Aplikebla al arĥitekturo kaj artaĵoj
- Malsamoj inter landoj:
  - Usono: Malalta sojlo
  - Germanio: Alta sojlo

# Escepto 4: Banala inkludo – *de minimis*

- *De minimis* estas latina esprimo por “pri plej etaj aĵoj”
- Jura koncepto kiu ebligas ignoron de banala kopiado
- Foje menciata en validaj leĝoj
  - …kiel ekz. en Germanio, Israelo kaj Britio
  - Kutime permesas “hazardan” inkludon
- Foje plenbazita sur kaza juro
  - …kiel ekz. en Usono
- En la Komunejo oni ĉiam supozis ian ĝian ekziston



# Leĝaj devoj de la Vikimedia Fondaĵo

- La ĉefa servilejo de la Vikimedia Fondaĵo troviĝas en Tampo, en la usona ŝtato Florido
  - Tial ĉiu enhavo devas respekti la leĝojn de Usono
  - Ne ekzistas leĝa devo respekti la kopirajtan juron de ajna alia lando
- Angla Vikipedio: Ĝia enhavo nur devas esti libera en Usono – Wikipedia:Non-U.S. copyrights
  - Vikimedia Komunejo: Ĝia enhavo devas esti libera en Usono kaj en la devenlando - Commons:Licensing

# Plenumo de la usona kopirajta leĝaro

- Ne ekzistas ajna klara kaza juro pri interago de alilanda LdP kun usona juro
  - Oni supozas ke Usono uzus siajn proprajn LdP-regulojn sendepende de la loko
  - Eblas imagi malakcepton de skulptaĵoj kaj artaĵoj laŭ LdP konsiderante usonan juron
  - Neniu kaza juro
  - En la praktiko oni postulas respekton precipe en la devenlando

# Tri kategorioj de kopirajta stato

- Fakte temas pri tri kategorioj de bildoj
- Ruĝaj bildoj: Kopirajtitaj en Usono
  - Ekzemple: Skulptaĵoj situantaj en Usono
  - Vikimedia Komunejo: Malpermesitaj
  - Ĉiuj aliaj projektoj: Malpermesitaj (krom justa uzo kiel “nelibera enhavo”)
- Flavaj bildoj: Kopirajtitaj en la devenlando
  - Ekzemple: Konstruaĵoj kaj skulptaĵoj situantaj en Francio
  - Vikimedia Komunejo: Malpermesitaj
  - Ĉiuj aliaj projektoj: Permesitaj (se lokaj alŝutoj estas permesitaj)
- Verdaj bildoj: Ne kopirajtitaj en la devenlando
  - Ekzemple: Konstruaĵoj en publika loko en Germanio
  - Vikimedia Komunejo: Permesitaj
  - Ĉiuj aliaj projektoj: Permesitaj

# Problemoj pri respektigo en la Komunejo

- Oni jam spertis ekz. jenajn problemojn:
  1. Malkonsento pri rapida forigo
  2. Malkonsento pri interpretado
  3. Manko de unueco
  4. Manko de atento en la pasinteco
  5. Influo al aliaj projektoj

# Problemo 1: Malkonsento pri rapida forigo

- Rapida forigo estas forigo fare de administranto sen diskuto
  - En la Komunejo ĝi ne ekzistas kiel „regulo“
  - Bildoj tamen estis/estas rapide forigataj pro manko de LdP
  - “La temo LdP estas tro komplika por permesi rapidan agon.” – Commons:Deletion requests/Template:FOP-cv
  - Propono Commons:Criteria for speedy deletion – kriterio “neekzisto de LdP” forigita
  - Ankoraŭ ne troviĝis konsento en la komunumo

# Problemo 2: Malkonsento pri interpretado

- Kaŭzoj de malkonsento:
  - Dependeco je traduko
  - Neceso interpreti la signifon
- Ekzemple: Israelo
  - LdP ekde 2007 koncernas “arĥitekturajn verkojn”, “skulptaĵojn” kaj “aplikitan arton”
  - Aperis voĉoj laŭ kiuj „aplikita arto“ havas en la hebrea lingvo pli vastan signifon ol en la angla
  - Estas duboj ĉu la regulo inkluzivas 2D-artaĵojn
  - Eseojn pri la temo verkis Deror avi, Pieter Kuiper kaj Drork

# Problemo 3: Manko de unueco

- Unuopajn bildojn oni kutime diskutas ĉe Commons:Deletion requests
- Ofte longa atendovico
  - …kaj tamen multaj kazoj decidiĝas post apenaŭ iu diskuto
- Malsama traktado de:
  - Kie situu la sojlo de originaleco
  - Kio akcepteblas kiel *de minimis*
- Manko de kaza juro nur pligravigas la problemon
- Petoj pri forigo pro tio fariĝas malpli efikaj
- Petoj pri forigo rilataj al LdP en Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj rezultis jene:
  - 180 bildoj estis forigitaj
  - 165 bildoj <u>ne</u> estis forigitaj

# Problemo 4: Manko de atento en la pasinteco

- Komunejo lanĉiĝis la 7-an de septembro 2004
- Commons:Freedom of panorama aperis maljam la 25-an de majo 2006
- Reguloj evoluis iom post iom
- User:LoverofDubai
  - Alŝutis centojn de bildoj pri konstruaĵoj en Dubajo inter la 19-a de aŭgusto 2007 kaj novembro 2008
  - En Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj ne ekzistas LdP sed neniu atentigis lin kaj neniu malhelpis al li ĝis …
  - … inundo de petoj pri forigo kiu komenciĝis la 1-an de januaro 2010
  - Ĉu tio estas justa konduto al la kontribuinto?

# Problemo 5: Influo al aliaj projektoj

- Amasaj bildoforigoj en la Komunejo negative influas aliajn vikimediajn projektojn
- Unuopaj projektoj aliras la problemon diversmaniere:
  - Angla Vikipedio: Evidenta konfuzo
    - Template:Non-free architectural work Instruas ke fotojn de konstruaĵoj oni alŝutu kiel neliberan enhavon
      - Parolas pri “devenlando” – eraro!
      - Ĉiukaze oni tiun ŝablonon ofte ignoras
    - La regularo Wikipedia:Public domain ne diras sufiĉe klare ke ĉi-loke gravas nur la kopirajta juro de Usono
  - Vikipedio en simpla angla: Alŝutado de bildoj malpermesita
    - Ne neliberaj bildoj; liberaj bildoj eniras la Komunejon – Wikipedia:Image use policy
    - Kaj kio pri la flavaj bildoj?
    - La nuna regularo devenas de 2006

# Eblaj solvoj

- Ne ekzistas klara konsento pri ŝanĝoj
  - Verŝajne evoluo per etaj ŝanĝoj
  - Tame ankaŭ radikalaj ŝanĝoproponoj

# “Fajfu pri tio”

- Propono ŝanĝi la regularon tiel ke nur la usona kopirajta juro aplikiĝu al bildoj pri arĥitekturo kaj artaĵoj
- Malplistriktigo de la nuna Komuneja regularo
  - … ĉar la nunaj reguloj malhelpas la edukan mision de la projekto
- Simila propono ĉe Commons:Photographs of modern buildings
- Kelkaj similaj fenomenoj kiuj povus esti modelo:
  - Pri personaj rajtoj oni nur faras atentigon per ŝablono en la momento de alŝuto
    - … sed tio ne rilatas al kopirajto
  - Fotografia reprodukto de publikhavaĵaj artaĵoj estas permesita sendepende de eventuala kopirajto en la devenlando
    - … sed tio ricevis specialan aprobon de la Vikimedia Fondaĵo
- Ĉu oni decidadu laŭ detalaj kriterioj pri ĉiu kazo aparte?

# Konkludoj

- La nuna situacio ne estas bona
- La Komunejo bezonas pli fortan konsenton kaj pli unuecan traktadon
- Aliaj projektoj devas pli atenti la temon
- Ĉu venis tempo por repripensi la bazajn kopirajtajn regulojn de la Komunejo?
- Ĉu la Vikimedia Fondaĵo partoprenu la diskuton pli aktive?

# Bildo-atribuo

*Laŭ ordo de apero*


- Itzike (2011) File:Wikimania 2011 Haifa Logo.png. Havebla ĉe: http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Wikimania_2011_Haifa_Logo.png [Vizitita 25 Jul 2011]
- Christopher T Cooper (2011) File:Boldrewood Campus Annexe Building of the University of Southampton from Burgess Road 2.jpg. Havebla ĉe: http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Boldrewood_Campus_Annexe_Building_of_the_University_of_Southam [Vizitita 31 Jul 2011]
- King of Hearts *et al* (2011): File:Freedom of Panorama in Europe NC.svg. Havebla ĉe: http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Freedom_of_Panorama_in_Europe_NC.svg (Vizitita 29 Okt 2011)
- Adnergje (2006) File:Tower of Pisa.jpg. Havebla ĉe: http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Tower_of_Pisa.jpg [Vizitita 31 Jul 2011]
- Boeing (2007) File:Boeing wordmark.svg. Havebla ĉe: http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Boeing_wordmark.svg [Vizitita 30 Jul 2011]
- H B *et al* (2003) File:SED Logo.svg. Havebla ĉe: http://commons.wikimedia.org/wiki/File:SED_Logo.svg [Vizitita 30 Jul 2011]
- Christopher T Cooper (2009) File:Water bus in Dubai Creek.jpg. Havebla ĉe: http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Water_bus_in_Dubai_Creek.jpg [Vizitita 31 Jul 2011]

# Demandoj?